

Verschiĝnt maandelijks Vertegenwoordiger in Nederland:
Een en twintigste jaarg. L E E N
Nummer 1 (234) sek. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
JAN. 1954 postrek. 34563 van P. M. Mahesoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 100, MECHELEN
Postrekening 2321.50 van V. E. B.
Raapstr. 74, Gent

LIDGELDEN:
* Leden: 100 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan

ABONNEMENTEN:
België: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

1954

NI REVIVIGU NIAJN KLASIKULOJN

de F. Faulhaber

Kion tiu jaro al ni alportos?
Jen la demando kiun certe multaj aktivuloj en nia movado primeditos. Vere la lastaj jaroj ne estis malbonaj por la tuta esperantista movado en la mondo, ĉar neniam antaŭe la malfacilaĵoj kaŭzitaĵ de la lingvodiverso en multaj internaciaj konferencoj estis tiel multe preparolataj en diversaj grandaj ĵurnaloj. Antaŭ la dua mondmilito la ĵurnaloj kutimis simple prisilenti tiujn malfacilaĵojn kaj nur sporade oni publikigis ion pri tio.

Sed lastatempe tiu sinteno ŝanĝiĝis kaj eĉ en gravaj internaciaj organizadoj oni diskutis pri tiuj malfacilaĵoj pri kio atestas la artikolo en antaŭa numero pri Angla-franca dulingveco en Eŭropo. Kompreneble tiu propono ne donas solvon kiel Dr. Wilhelm Herrmann, prezidanto de Germana Esperanto Asocio klare montris en la nomita artikolo.

Tamen la apero de tiaj proponoj evidente pruvas, ke oni pli kaj pli agnoskas ankaŭ en internaciaj instancoj, ke la lingva problemo nepre ekzistas kaj tio estas jam progreso kompare kun pli fruaj jaroj, kiam oni neglektis kaj ignoris la ekziston de tiuj malfacilaĵoj, helpante sin per interpretistoj kaj genie elpensitaj aparatoj.

Kiel klare montriĝas ĉi tie la antaŭvida rigardo de D-ro Zamenhof, kiam li skribis: „La enkonduko de lingvo internacia pli aŭ malpli frue nepre kaj sendube efektiviĝos, kion ajn la rutinistoj batalus kontraŭ ĝi.”

Jes, vere la rutinistoj ankoraŭ baraktas kontraŭ la enkonduko de internacia lingvo sed la ŝanĝiĝo de opinioj jam estas en fluo kaj la irado de la okazaĵoj jam pruvis la eldiron de Zamenhof vera.

Kaj same pruviĝos vera la jena eldiro de D-ro Zamenhof: „Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom Esperanto, malgraŭ tio ke la rutinistoj ankoraŭ provos kiom eble plej longe kontraŭbatali tion.”

Bonaj antaŭsignoj estas la pritrakto de nia afero en la konferenco de UNESKO en la nuna jaro kaj la rezolucio de la mondfederalistoj okaze de kunsido en Kopenhago.

Same estas ĝojige ke en la pasinta jaro en diversaj ĵurnaloj aperis esperantaj kursoj kaj ni tre esperas, ke tio okazos ankaŭ en la nuna jaro. Estas necese, ke ni streĉu ĉiujn fortojn por la lasto atako, ĉar la fina venko povas esti multe pli proksima ol ni nun povas antaŭvidi.

F. W.

Legante verkojn de Zamenhof, Kabe kaj Grabovski, ni surprizite konstatas la simplecon, klarecon kaj naturecon de ilia stilo, kiu ne ŝanĝiĝas eĉ se la temo estas malpli „ĉiutaga”. Estas ekzemple, vera ĝuo legi klom „ordinare”, simple kaj por ĉiu kompreneble Zamenhof ekplikas en „Lingvaj Respondoj” diversajn gramatikajn. Sed en pluraj verkoj de nuntempaj aŭtoroj el la lastaj jardekoj ni trovas tie - ĉi tie stilon malpli malpezan. Oni rekomendas en tiuj verkoj frazkonstruojn, kiujn la tradukintoj - ĉar temas preskaŭ ĉiam pri tradukoj - certe ne uzus, se ili verkus originale. Kompreneble ili devas kiom eble imiti la stilon de la aŭtoro, sed nur kiom eble, ĉar ne ĉiam la rezultato impresas la leganton same kiel la originalo. En la ĉi supre aluditaĵ okazoj la tradukintoj evidente tro multe klopodis precize redoni la originalan tekston. Se, por kompreni, la leganto de la traduko devas penadi pli multe ol la leganto de la originalo, la traduko povas esti gramatike senerara, sed tamen ne sukcesa. La lingvo devas esti en harmonio kun la temo, devas formi kun ĝi unu tuton, por ke la leganto komprenu la temon tiel, kiel la aŭtoro deziras. La leganto ne atentu la lingvon aparte. Se ekzemple eraroj, komplikaj frazoj, malklaraj esprimmanieroj k.s. lin devigas okupi sin pri la lingvo anstataŭ pri la temo, tiam la ligiteco inter temo kaj lingvo rompiĝis, kaj nur pene li ricevas bildon de tio, kion la aŭtoro volas diri. La lingvo de iu verko estas des pli taŭga, ju pli bone ĝi klarigas la verkon.

Mi legis diversajn verkojn en iliaj originalaj kaj Esperantaj formoj, kaj plurfoje konstatis, ke tio, kio en la originalo staras tuj kaj klare antaŭ niaj spirantaj okuloj, en la traduko kaŝiĝas en malglataj kaj komplikaj frazoj, kiuj difektas mian plezuron en legado. Tia legado similas malimplikon de implikiĝinta ŝnuro

Rekomendante facilan stilon, mi kompreneble ne aludas stilon taŭgan por infanaj legolibroj. Ankaŭ Kabe ne pen-

sis pri tio, kiam li diris: „Se efektive mi ne estas malbona stilisto, mi havas nur unu meriton: ke mi atente legis kaj studis la verkojn de nia Majstro, inokulis al mi la mirindan simplecon kaj naturecon de lia stilo kaj penis ĉiam ĝin imiti. Se mi sukcesis, mi atingis la rezultaton nur dank' al la elekto de bona modelo kaj al fidela imitado”. Kaj aliloke pri Zamenhof: „Kiel stilisto li estis bonega, ĉar li havis stilon eksterordinare simplan”

La stilo de Zamenhof, Kabe kaj Grabovski ankoraŭ ĉiam meritas esti nia modelo. Por ke ĝi ne elmodiĝu favore al la fuŝa stilo de kelkaj tradukantoj, necesas ke aŭtoroj kaj tradukantoj estu en konstanta kontakto kun niaj klasikuloj, legante kaj relegante iliajn verkojn.

Bedaŭrinde tiuj verkoj grandparte estas elĉerpitaj. Eĉ la oficiala „Fundamento de Esperanto” ne plu estas akirebla! Kaj la duonoficiala „Fundamenta Krestomatio” preskaŭ elĉerpiĝis! Preskaŭ ĉiam vane oni serĉas en la anoncoj en diverslandaj Esperanto-organoj la titolojn de niaj klasikaj literaturaj. Kaj la devizo: „Ĉiu esperantisto nepre posedu la verkojn de nia Majstro” malaperis! La novuloj en nia movado do ne havas la okazon havigi al si liajn verkojn, nek tiujn de Kabe kaj Grabovski. Ŝajnas, ke la eldonintoj ne intencas reeldoni ilin. Tio estus bedaŭrinda! Mi opinias, ke el instrua kaj lingvohistoria vidpunkto la verkaro de niaj klasikuloj devas esti konservata. Represo estas nepre necesa. Se ni faros por tiu ideo bone organizitan propaĉandon, kaj el financa vidpunkto saĝe aranĝos la sinsekvantan aperon de la diversaj volumoj, - se ni presigos la librojn kun tipografie plaĉa aspekto kaj solida bindaĵo, mi opinias, ke estos eble kolekti sufiĉe da abonoj por starigi per ĉi tiu biblioteko monumenton honore al niaj klasikuloj kaj favore al bona esperanta stilo!

Ni revivigu niajn klasikulojn!

(Resumo de artikolo el „La Progreso”, okt. 1953).

ANTAŬKONGRESO EN ANTVERPENO

Estas jam tradicio ke, antaŭ kaj post ĉiu Universala Kongreso, la aliĝintaro estas invitata ĉeesti, ie kaj iom apude al la Kongresurbo, antaŭ- kaj postkongreson.

Se la postkongreso ofte okazas en sama lando, la antaŭkongreso kontraŭe estas kutime organizata en najbara lando, kiun multaj kongresanoj devas trapasi kaj en kiu ili do iom facile povas halti.

La postkongreso de la Universala Kongreso de Haarlem, tiun jaron, okazos, kiel jam anoncite, en Leeuwarden, en la Norda Nederlando.

Ni povas nun oficiale anonci, ke la Antaŭkongreso okazos en Belgujo, tiel ke multaj angloj, francoj, svisoj, italoj kaj ankaŭ aliaj interesuloj povos ĝin partopreni.

Estas la amikoj kiuj, sub la prezidanteco de S-ro Maur. Jaumotte, organizis la tiel bele sukcesintan Beneluxan Kongreson dum la Pentekostaj tagoj en Antverpeno, kiuj prenis sur sin iniciati, en sia urbo, tiun internacian kunvenon, kiu daŭros tri tagojn.

Ĝi komenciĝos la merkredon, 28an de julio, kaj daŭros ĝis vendredo vespere la 30a de julio, do la tago antaŭ la komenciĝo de la Universala Kongreso.

Ĉiuj partoprenantoj al tiu Antaŭkongreso do akurate povos ĉeesti la malferman solenan kunsidon en Haarlem.

La definitiva programo ne jam estas firme kunmetita. Tamen la detaloj jam nun konataj sufiĉas por antaŭvidi agrablajn tagojn en la, - dum la Pentekostaj tagoj -. SENEGALA ANTVERPENO...

Dum tiu antaŭkongreso, okazos la sole na inaŭguro de la D-ro ZAMENHOF-strato, pri kiu decidis la urbestro, okaze de la Beneluxa Kongreso.

Estas antaŭvidataj ankaŭ diversaj ekskursoj sur la Skeldo kaj en la ĉirkaŭaĵo de Antverpeno, pluraj interesaj vizitoj al muzeoj kaj industrioj, kaj krome, kelkaj gravaj prelegoj de eminentuloj.

Rilate al la vespera amuzo, la L.K.K. - la sama do kiel je Pentekosto - anoncas vesperfeston, kun muzika parto, skeĉoj, k.t.p., kaj grandan internacian balon.

La kotizo estas fiksita, kiel tiu de la tritaga Pentekosta kongreso, je Belgaj Frankoj 50.-, kiuj, de nun, povas esti pagataj al P.Ĉ.K. 10.06.30 de la Esperanto-Kongreso, Deurne-Antverpeno.

Tiuj, kiuj deziras pliajn klarigojn aŭ informojn povas sin eventuale turni al S-ro H. Sielens, sekretario, Houwerstraat 12, Antverpeno.

Ni tamen konsilas al ĉiuj atendi kelkajn tagojn, ĉar, en la daŭro de tiu ĉi monato, iom pli detala kaj preskaŭ oficiala programo estos ne nur kunmetata, sed ankaŭ konigata pere de la grupoj kaj en la februara numero de nia revuo.

Memorige, ni diru ke la Loka Komitato por tiu Antaŭkongreso konsistas el S-roj Maur. Jaumotte; D-ro Th. Van Gindertaelen; H. Sielens, A. Pittoors, F. Volders kaj J. Verstraeten.



39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM

Postfako 140, Haarlem, Nederlando.
31-an julion - 7-an aŭguston 1954

Dec. 1953 OFICIALA KOMUNIKO N-RO 3

Pagoj: Rotterdamsche Bank, Haarlem.
Postĝirkonto 604997.

Pagante per tiuj kontoj nepre samtempe sendu aliĝilon kun detaloj pri la pagoj. Venis pluraj pagoj sen aliĝiloj, do sen adresoj. Iuj kongresanoj pagas al peranto sed sendas la aliĝilon al Haarlem. Nepre ne faru tion. Sendu ambaŭ al la sama instanco.

Kotizo - nova periodo: La kotizo plialtiĝas en januaro 1954. Vidu la Aliĝilon. Nepre aliĝu tuj por profiti la favoran tarifen.

Studentoj: Studentoj rajtas aliĝi al la kongreso je la sama tarifo kiel junulo (triono de la koncerna kotizo. Vidu la Aliĝilon). La aliĝilon tamen devas akompani atesto de la fakultato de la studento.

Blinduloj: Gvidantoj estas petataj sciigi al blindaj samideanoj, ke por profiti la senpagan kongreskarton (ankaŭ por la gvidantoj) ili devas sendi kun la aliĝilo ateston de blindula asocio aŭ de okulkuracisto. Tiu favoro validas nur ĝis fino de marto.

Post tiu dato blinduloj kaj gvidantoj pagas po duono de la tiuperioda kotizo.

Blindula Kongreso okazos samtempe kiel la U.K. Kontaktulo por estas: S-ro A. G. Verlinde, P. v. d. Doesstraat 44, Amsterdam, Ned.

Perantoj: Notu novan karavanarandon de G.E.E. (Instruistoj) en Francujo: S-ro M. Fouski, 22 Rue Gauvin, Angers, M. et L.

L.K.K. atentigas, ke en iuj landoj ekzistas oficiala peranto de la kongreso (kutime reprezentanta la landan asocion) kaj privataj karavan-aranĝoj. Tiuj lastaj peras la kotizojn nur de siaj anoj. Pro motivoj de solidareco kaj lojaleco estas ĉiel dezirinde, ke kongresanoj laboru en la kadro de oficiala aranĝo. Informon pri tio oni povas havigi al si per la koncerna landa asocio.

Statistiko (ĝis fino de novembro): Aŭstrio 3, Belgujo 14, Brazilo 3, Britujo 86, Danujo 13, Finnlando 8, Francujo 12, Germanujo 25, Hispanujo 3, Indonezio 1, Italujo 19, Japanujo 1, Jugoslavio 35, Kanado 2, Kostariko 1, Nederlando 206, Norvegujo 17, Novzelando 9, Portugalujo 2, Svedujo 24, Svislando 12, Usono 4. Sumo 500 el 22 landoj (pasintjare 170).

Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.

Feliĉan jaron 1954 deziras al la membroj kaj legantoj viaj ĉefestraro, gvidanto de la „Studanto” kaj Redaktoro!

TRI LINGVAJ PIONIROJ

La lingvo, esence, estas socia fenomeno. Ĉiu provo de individuo enkonduki ŝanĝon aŭ novajn restas sen efiko, se la socio ne akceptas ĝin. Kelkfoje individuo sukcesas altrudi al sia gepatra lingvo vorton, kiun li mem konstruis aŭ eĉ inventis. En la „Transactions of the Philological Society” (1938) A.S.C. Ross citas el al estona lingvo vortojn kiaj **relv** por „armilo” kaj **nemp** por „bagatelo”, kreitajn de D-ro Aavik. En unu okazo la eraro de lingvisto enradikiĝis en la komuna lingvo: La hungaro Sajnovics, volante anstataŭigi la latinan vorton „forma” per ugro-finna vorto, trovis en lapona vortaro **mintá**, apud kiu troviĝis la signifo „formo, figuro”. Ĉar tiu lapona vorto memorigis lin pri la madjara esprimo **mint á** „kiel tiu”, li adoptis ĝin kaj ĝi estas nun komune uzata. Fakte **mintá** en la lapona signifis „monero”, kaj la vorto por „formo” devus esti **minstar**, sed pro preseraro la du vortoj konfuziĝis. Laŭ la Oksforda angla vortaro ankaŭ la angla vorto **syllabus** povas daŭrigi la eraron de humanisto, kiu mislegis la grekan **sittabos** „etikedo”.

En la ekzemploj cititaj individuoj, do, lasis siajn postesignojn; sed nur en disaj vortoj. Multe pli maloftaj estas la okazoj, kiam individuo influis grandskale la evoluadon de sia lingvo aŭ eĉ kreis tute novan lingvon, kiun liaj samlandanoj estis pretaj akcepti. Ĉi tie ni povas prikonsideri la klopodojn de tri gravaj reformemuloj sur lingva kampo: la finno **Lönnrot**, kiu igis la finnan kapabla servi kiel plena kulturlingvo, la norvego **Aasen**, kiu igis la norvegan sendepa de la dana, kaj **Zamenhof**, kiu konstruis el elementoj komunaj al multaj eŭropaj lingvoj neŭtralan lingvon kiel duan komunikilon por ĉiuj popoloj.

Kiam Elias **Lönnrot** naskiĝis en 1802 en vilaĝo sufiĉe proksima al Helsinko, la pozicio de la sveda lingvo kiel la kulturlingvo de Finnlando estis nekontestebla. Tamen, la anekdo de Finnlando per Rusujo en 1809 kaj la koncedo de konstitucio igis la kondiĉojn pli favoraj al la revivigo de la finna. Elias estis filo de malriĉa tajloro kaj devis luktati por akiri edukon. Fine li sukcesis en skribiĝi en la universitato de Abo (Turku), kie li studis unue la filozofiajn fakojn kaj poste la medicinon. Fariĝinte kuracisto en la kampara vilaĝo Kajaana, li baldaŭ interesiĝis pri la restaĵoj de folkloro kaj popolkantoj. Li entreprenis grandajn vojaĝojn piede tra la primitivaj regionoj de Orienta kaj Rusa Karelio kaj sukcesis kolekti abundan materialon por rekonstrui el popolkantoj la vastan nacian eposon de la Finnoj, pritraktante la heroojn kiajn Väinämöinen kaj la forĝiston Ilmarinen, kaj la serĉadon de la „sampi” aŭ magia muelilo. La unua eldono de la „Kalevala” aperis en 1835, la dua en 1849 jam enhavis pli ol 22000 versojn. Ĝi ne nur populariĝis en Finnlando, sed baldaŭ estis konata en tuta Eŭropo per la franca traduko de Léouzon le Duc (1845), la germana de Schiefner (1852) kaj la sveda de Collan (1864). Super ĉio ĝi alportis prestiĝon al la finna lingvo, kiun Lönnrot riĉigis per multaj nove formitaj terminoj, ekz. en matematiko, sciencoj, juro k.t.p. kaj kiun li firme establis per giganta finna-sveda vortaro enhavanta pli ol 200000 vortojn.

La fono de Ivar **Aasen** iom similis al tiu de Lönnrot. De la 14a jarcento ĝis 1814 Norvegujo estis regata de la reĝo de Danujo. Estis ĉiam multaj danaj oficistoj kaj pastroj, la Biblio estis danlingva kaj la junaj norvegoj kutimis studi en la grava kulturcentro, Kopenhago. Oni skribis la vortojn de la norvega speco de la dana lingvo laŭ la reguloj de la dana ortografio, kvankam la norvegoj uzis malsaman prononcon. Jam en la 30-jaroj la norvegaj poetoj sopiris al pli hejmeca lingvo, sed efektive ĝi restis dano-norvega. Nur la kamparanoj kaj fiŝkaptistoj, precipe en la okcidentaj kaj sudaj regionoj, konservis dialektojn tre parencajn al la lingvo, kiun la islandanoj uzis ĉe la enmigro en la 9a jarcento. Ivar Aasen naskiĝis kiel filo de kampara laboristo en 1813 en Volde en la okcidenta regiono Sunnmøre. Kun granda persisto li edukis sin kaj fariĝis instruisto en kampara lerne-

jo, ofte vizitante la lernantojn en iliaj hejmoj, kaj poste privatinstruisto en familio. Li fervore studis la botanikon kaj kolektis la popolnomojn de ĉiuj kreskaĵoj. Tio igis lin studi pli zorge la regionajn dialektojn, kaj subtenate de patriotaj norvegoj li faris vojaĝojn por enlistigi dialektvortojn kaj parolturnojn. En 1848 li eldonis gramatikon de la de li nomita „norvega popola lingvo” (folkesprog) kaj en 1850 grandan vortaron. Kun granda takto kaj sento por la valoroj de iom arkaika, sed forta kaj intima parolmaniero, li mem elektis kaj kompilis el la diversaj dialektoj novan superdialekton, kiun li nomis la „landsmaal”, t.e. lingvo de la lando nuntenpe nomata nov-norvega (nynorsk). Li eĉ verkis en ĝi kantatonojn kaj poeziaĵojn (**Symra**, t.e. Anemonoj). Spite de la opozicio de Ibsen kaj Björnson, kiuj favoris la dano-norvegajn formojn uzatajn en Oslo kaj la orienta regiono, la lingvo de Aasen estis adopta de gravaj verkistoj (Arne Garborg, Olav Dunn) kaj fine oficialiĝis per instruo en lernejoj kaj uzo en administrado paralele kun la „bokmaal”, e.t. la librolingvo pli parenca al la dana.

La fono de **Zamenhof** estis la pola urbo Byalostok sub la regado de la rusaj caroĵ. Tie li naskiĝis al judaj gepatroj en 1859. Jam en la infanaĝo turmentis lin la manko de simpatio inter la diversaj rasoj kaj religioj (katolika, grek-ortodoksa, juda). Tre frue li lernis krom la pola, rusa kaj germana lingvoj la klasikajn, poste la francan, italan kaj anglan kaj kompreneble la hebrean. Li havis ĉiam grandan amon al la rusa lingvo, sed li admiris la simplecon de la angla gramatiko. Jam en la gimnazio li volis krei harmonion per la ellaborado de helplingvo facile lernebla kaj uzebla por ĉiuj, kaj liaj kunlernantoj festis lian unuan projekton kiam li estis 19-jara. Ŝajne hazarda observado donis al li la ŝlosilon por atingi maksimuman simplecon. En la stratoj de pola urbo li vidis la saman finajon **-skaja** (fakte adjektiva fleksio) sur la domo de pordisto kaj la butikoj de konditoroj. Li ekpensis, ke se oni havas serion da sufiksoj kun difinitaj funkcioj (aganto, loko, kolekto k.t.p.) oni povas fari el malgranda nombro da bazoj aŭ „radikoj” miliojn da novaj vortoj. Iom post iom li plibonigis sian lingvon kaj fine, en 1887, eldonis libron kun titolo „La Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto” uzante „Esperanto” kiel pseŭdonimon pro la rusa cenzuro. Baldaŭ la plena titolo reduktiĝis en parolo ĝis „la lingvo Esperanto”.

BIBLIOGRAFIO

ANTOLOGIO DE BRAZILAJ RAKONTOJ, elektitaj de la Brazilia Akademio, kun antaŭ-parolo de Barbosa Lima Sobrinho, prezidanto de la Akademio. Eld. Brazilia Esperanto-Ligo -- 1935 -- 311 p.-

Tranĉmalfermante la 311-paĝan, bonaspektan libron (kial ankoraŭ nuntenpe tia teda laboro?) ni senvole pensis al antaŭmilita raporto de eminenta flandra verkisto, Maurice Roelants, pri tiama PEN-kongreso en Edinburgo, dum kiu la flandraj partoprenantoj estis komisiataj studi la eblon eldoni „internacian” revuon... en la angla, franca, germana, favore al la literaturoj ne apartenantaj al tiuj vastaj lingvoteritorioj. „Kion ni scias”, li demandis, „pri la baltaj, la sud-amerikaj, la balkana literaturoj? Kion scias la mondo pri nia literaturo? Plifaciligi reciprokajn sciigojn estas PEN-tasko, pri kiu multaj en la kunveno simpatiis.” Kaj li finis per nova demando: „ĉu granda aerkastelo?” Ni timas ke jes, kaj substrekas la grandan meriton de la Brazilia Esperanto-Ligo, diskonigi la nacian literaturon ne nur al legantoj de la franca, angla kaj germana, kaj la saman meriton de s-ro Barbosa Lima Sobrinho, prezidanto de la Brazilia Akademio, kiu almenaŭ serĉis la vere internacian ŝlosilon en la ĝusta loko, kiam li agnoskas la kapablon de Esperanto doni ĝeneralajn informojn pri la kreaĵoj literaturaj.

En antaŭparolo li skizas la evoluon de la brazila beletristiko, kiu en sia unua periodo estis dependa de la portugala; post 1822 dum proksimume cent jaroj ĉefe de la franca, kaj kiun en tria stadio, post la unua mondmilito, fekundigis la universala influo. Ni aldonu, ke ĉe la pli junaj aŭtoroj oni rekonas ĝeneralajn eŭropajn tendencojn, kiel la simbolisman kaj la ekspresionisman. Kaj sekvas 33 ofte impresigaj rakontoj de 33 aŭtoroj (kun bibliografio), esperantigitaj de 33 tradukintoj, kiel iomete emfaze anoncite, kaj „en ĉiu traduko B.E.L. lasis la stilon propran al ĝia aŭtoro.” Pri tio ni rimarkigas ke, absolute pri kelkaj interesaj idiotismoj, pli da lingva unueco kaj tial eble malpli da tradukintoj, krom la lingve tre spertaj, estus dezirindaj. Pluraj tradukoj bedaŭrinde ja ne estas senmakulaj. Ni nur atentigu pri kelkaj eraraj formoj kaj prepozicioj, pri la arkaikiga uzo de iuj sufiksoj kaj jenaj absurdaĵoj: drapo el la plej bona... silko; (16): ĉapelo kiu (malfacile) eniras en la... kapon (19); iu kiu laboras en... sia skribotablo (75) kaj „vestaĵoj kiuj ekflugas el... virino” (273) - Parenteze, la Nederlandano miros pri tio, ke la aŭtoro Luis Guimaraes Filho, vizitante muzeilon en la ĉirkaŭaĵo de Leiden, sin kredis „en la izoleco de flandra kamparo” (La Mueliloj, p. 177).

Feliĉe tiuj malperfektaĵoj ne tro grave influas la ĝeneralan valoron de la verko. La frazkonstruo estas orda kaj tial la rakontoj flue legeblaj. La leganto, enirante iom primitivan, ofte

krudan socion, en kiu la virino ordinare ne ludas ĉefrolon, enspiras la aeron de la brazila kamparo kun brutoj, birdoj kaj vegetaĵoj, super kiu vibras la tonoj de gitaroj kaj kanzonoj. La rakontaro prezentas okazon kontakti kun folkloro kaj diversaj aspektoj de la brazila popolkaraktero, i.a. en la persono de iuj stranguloj, de negroj, gaŭĉoj, ordinaraj bovgardistoj, fiŝkaptistoj kaj barkistoj, fortikaj homoj, fajranime ekscitigemaj kaj pasie vengemaj, viroj kiuj facile briletigas tranĉilon aŭ manipulas fusilon. Patoson aŭ bombaston oni ne timu ĉe tiuj modernaj brazilaj verkistoj, kiuj kontraŭe sobre rakontas kun inklino al eksterordinaraj, dramecaj situacioj, al fabla kaj fabela moraligo kun foje speciala iom obtusa humoro.

TYNEVERUM.

PIONIRO MORTIS!

Antaŭ kelkaj tagoj mortis, 83 jarojn aĝa, OCTAVE CHALON, en nia ĉefurbo. Kun li malaperis unu el la pra-esperantistoj de Bruselo. Li apartenis en 1905 al la Esperantista Sekcio de la Poliglota Grupo de Bruselo, lokita Hôtel Ravenstein. En tiu grupo, jam depost 1898, Lucien BLANJEAN gvidis kurson, dank' al la propagando kaj la influo de Romandanto Charles LEMAIRE. La anaro de tiu studsekcio foudis en 1907 „La Pioniro(n)”, kiu kunvenis en „La Louve” Granda Placo. S-ro CHALON estis tiam sekretario de la grupo. El la vicoj de tiu grupo ni rememoru la fratinojn DELUYCK, F-inojn GREINER, LECONTE, GULLAUME, HOFMAN, Leŭtenantojn GIMINE kaj L. JAMIN, S-ron VANDERSLEYEN, VERBANK. Kelkaj el ili partoprenis la 3-an internacian kongreson de Cambridge en 1907. Inter ili estis OCTAVE CHALON, F-inoj DELFOSSE, LAUREYS, MOREA, SIMON, S-ino STAES kun Elly, Profesoro L. BLANJEAN, S-ro J. GAMIN (ĉefredaktoro de Belgu Sonorilo”), MAISONPIERRE, Leŭtenanto CARDINAL, kiu, unufoje, kiel ŝtata oficisto, reprezentis la registaron dum Esperanto-kongreso.

Abato RICHARDSON, animo de la Katolika Esperanto-movado en Belgujo tre ofte kaj amikege vizitas la lunsidojn de „La Pioniro”. Li predikas esperantigive dum la Diverso de la Cambridge-a Kongreso, kaj loĝis kun la ĉi-supre nomitaj bruselanoj en la sama „boarding house”, 35, Trumpington street, vid' al vide de FITZ WILLIAM MUSEUM, kie okazis la tre solena akcepto de nia Majstro fare de la urbaj aŭtoritatoj.

Onklo Oktave, kiel mi, - laŭ lia peto, - lin nomis dum nia kongresvojaĝo, estis afabla, bonhumora grandanima bildo el miaj infanjaroj, kiu ŝoviĝas en eternecon.

ELLY STAES.

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ

La Libro-Servoj deziras al vi ĉiuj prosperan novan jaron kaj povas liveri jenajn verkojn:

	Gld.	Belg. Fr.
La Aventuroj de Marteno Drake	3,25	40,—
Du Majstro-Noveloj	2,10	25,—
Morto de Trajno	5,30	65,—
Misteroj de VVivo (rakontaro)	2,50	—
Kredu min, Sinjorino	5,40	72,—
La Lanternisto	2,90	40,—
Judoj sen mono	2,90	40,—
La Knaboj de la Paŭlo-strato	1,20	16,—
La Karnavalo kaj la Somnambulino	2,35	30,—
Ferio kun la Morto (detektiva romano)	2,25	30,—
Colomba	1,20	16,—
Kiso de la Reĝino	2,35	30,—
Esperanto leerboek (Zondervan/Manders)	2,50	34,—
Deveno kaj vivo de Esperanto	2,25	30,—
Meulenhoff's Woordenboek	3,95	—

Sekciaj estraroj atentui!

La Libro-Servo LEEN konsentas 10% rabaton je Esperanto-leerboek (Manders/Zondervan) kaj je la interesa verko Deveno kaj vivo de Esperanto, kaj 5% rabaton je Meulenhoff's Woordenboek (Esp.-Ned./Ned.-Esp.) ĉe mendo de minimume 3 ekzempleroj.

Same agas F.E.I. koncerne „Deveno kaj vivo de Esperanto” (10%) kaj Schidlof's Vortaro (Prezo: 45 Fr.; rabato: 5%) por sekciaj estraroj de Fl.L.E.!

MENDU ĈE:

Libro-Servo L.E.E.N., Pythagorasstraat 122, Amsterdam
Flandra Esperanto-Instituto, Blankenbergse Steenweg 72, Brugge.

Depost tiu epoko Esperanto disvastiĝis en multaj landoj, estis uzata en multaj kongresoj kaj — restante fundamente la lingvo de Zamenhof — adaptiĝis al modernaj bezonoj, ekz. por sciencoj, teknologio, medicino, radio, aviado. Estas rimarkinde, ke Zamenhof, kiu cetere estis okulisto, mem rigardis Esperanton kiel ilon por pli alta celo, nome la interfratiĝo de ĉiuj rasoj kaj religioj sur komuna fundamento, kaj li stari-

gis la principojn de Hilelismo aŭ „homar-anismo”, t.e. la postulo, ke homo estu unualoke lojala al la interesoj de la tuta homaro. En tio li estis profeto, kaj lia programo meritas represon en ĉi tiu epoko, kiam oni pensas pri unuigitaj nacioj kaj „Federal Union”.

W. E. COLLINSON,
Profesoro de Lingvoscienco en la Universitato de Liverpool (Britujo)

LA JUNAJ DETEKTIVOJ de J. H. Sullivan kun ilustraĵoj de Brenda Goodwin. Prezo 2 ŝilingoj. Eldonita de The Esperanto Publishing Comp. Ltd.

Ĉi tiu libreto estas speciale verkita por geknaboj, kiuj lernas Esperanton en lernejoj aŭ aliloke kaj kiuj ŝatas historiajn pri kontrabandistoj, ŝtelistoj, subteraj tuneloj k.t.p.

Vere la enhavo estas streĉa kaj ni estas certaj, ke la junaj geknaboj ŝatos ĝin. La lingvo estas simpla kaj preskaŭ senerara: nur la ilustraĵoj havas iom antikvan karakteron, kiu fakte ne akordigas kun la personoj kaj situacioj prikribitaj.

La libreto estas aĉetebla ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe U.E.A.

Aperis Malgranda Gvidlibro tra Hannover. Eldonejo: Städtisches Verkehrs- und Presseamt, Hannover 3. Senpage havebla.

LA AKVOKATASTROFO: Tekstaro de la Filmstrio samnoma kaj tradukita el la nederlanda originalo de la anoj de la Esperanto Film-Grupo en Bergen op Zoom, Nederlando.

Ĉi tiu film-strio konsistas el 74 bildoj pri la granda katastrofo. La tekstoj ĉe la bildoj estas tre bonaj. Li volonte rekomendas ĝin.

Oficiala Radio de Ministerio de Agrikulturo en Montevideo (CX 26) elsendas programon s.t. „El Esperanto, idioma internacional” (Esperanto, internacia lingvo) ĉiun unuan mardon en la monato, je 11.30 (laŭ GMT 14.30-14.45, laŭ MET 15.30-15.45) per ondo 280 m, sub aŭspicioj de Urugvaja Esperanto-Societo.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915.
Schr. cursus voor gevorderden: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33-1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermeuwstr. 29, Badhoevedorp
Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
Vic-čefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

**PROSPERAN NOVAN JARON
AL ĈIUJ GELEGANTOJ
DEZIRAS LA ĈEFESTRARO!**

La ĉefestraro urĝe petas la sekciajn sekretariojn, agi laŭ la instrukcioj, kiujn ĝi kune kun la mandatoj por la sekciaj delegitoj per aparta cirkulero dissendis al la sekcioj kaj sendi antaŭ la 10-a de januaro tri ekzemplerojn de la membrolisto al la ĝen. sekr. kaj listojn de la sekciaj donacantoj al la ĝen. kasisto kaj al s.ino H. E. te Strake-Leafers, Linde-laan 14, Driebergen-R.

Se la sekcioj ne sendos novajn listojn de donacantoj, ni konsideros la malnovajn listojn kiel ĝustajn kaj do dissendos „De Esperantist” laŭ la listoj de la jaro 1953-a.

Kiel ĉefestraraninon por la norda distrikto la ĉefestraro kandidatigas f-inon A. Laverman el Leeuwarden.

**JARKUNVENO
LA ESTONTO ESTAS NIA**

Dimanĉon la 4-an de aprilo

AMERSFOORT

Ejo: „Vanouds 't Tramstation”, Stationsplein 4, Amersfoort.

PROVIZORA PROGRAMO:

- 10.30 Malfermo de la jarkunveno.
- 12.30 Komuna varma manĝo.
- 13.30 Prelego.
- 14.15 Daŭrigo de la jarkunveno.
- 17.00 Fermo.

La tagordon de la jarkunveno ni publikigos en venonta numero.

Krom la sekciajn delegitojn kaj aliajn oficialulojn ni atendas multajn anojn, precipe de najbaraj sekcioj el Amersfoort, Arnhem, Hilversum, Bussum, Amsterdam kaj Utrecht.

ENIRO SENPAGA.

PROPONOJ POR LA JARKUNVENO

La ĉefestraro proponas, ke la kotizoj por la jaro 1954 estos egalaj al tiuj por la pasinta jaro.

Sekcio Amsterdam proponas, ke L.E.E.N. donacu el la centra kaso g. 100,- al C.E.D. kaj ke la sekcioj kune aldonu g. 100,- proporcie laŭ la membronombroj. La duono de la subvencio, kiu do entute sumiĝos g. 200,-, estu por C.E.D. kaj la alia duono por la „fondajo Montevideo”.

Gazetar-Servo L.E.E.N.

Okaze de la jarŝanĝigo ni deziras al niaj kunlaborantoj prosperan kaj feliĉan novjaron. Multan luktemon kaj amon por nia celo, ĉar certe ni venkos!

Kelkajn rimarkojn ni tamen volas konfidi al vi, ĉar ni havas malfacilaĵojn kun kelkaj el vi nome: Aldonu ni petas la aperlokojn de ekzemple „Trouw” ĉu Rotterdamo aŭ Arnĥemo k.t.p.; la sama estas kun „Het Vrije VOLK” kaj „Het Parool”, do ni afable petas al vi aldonu ankaŭ la *aperlokon*.

Multe ni deziras viajn leterojn, kvankam pri la sama artikolo unu laŭdas nin kaj alia montras la dentojn, eĉ advokato montras minacante la fingron, sed ne gravas: sen kontraŭulo ni ne povas prosperi.

Fine de tiu ĉi monato ni publikos nian raporton kaj certe vi miregos.

Antaŭ kelkaj monatoj D-ro Lapenna en Rotterdamo diris: „Mi ne emas bati je la pupitro sed kiam mi devas fari tion, vi zorgu ke mia pugno estos forta”.

Estas ankoraŭ kelkaj, kiuj neniam havas sukceson, ni urĝe petas informojn pri la kialo. Ankaŭ la ne-oficialaj Gazetar-komitatoj estas petataj sendi eltranĉaĵojn al ni, ĉar oni ne povas legi kaj kontroli ĉiujn gazetojn.

Gesam-oj Oosthoek, Bree 49a, Rotterdam

EXAMEN-UITSLAGEN

Utrecht, 31-X-'53.

Aangemeld voor diploma B (onderwijsbevoegdheid) 17 kandidaten, opgekomen 17, geslaagd 11: de dames C. Bijmolt-Ochtman te Amsterdam, A. Kooy-v. Holst en I. A. J. M. Rees-v. d. Ende te Rotterdam en de heren G. Clobus te Amsterdam, H. Groendijk te Arnhem, L. J. Dankart te Breda, D. de Boer, A. J. Nijdam, J. Verbruggen te Den Haag, J. Kuyjpers te Rotterdam en G. H. Koudijs te Utrecht.

Aangemeld voor diploma A 28 kandidaten, opgekomen 25, geslaagd 15. De commissie zag zich tot haar leedwezen genoodzaakt, 2 kandidaten wegens fraude te disqualificeren. Geslaagd de dames Th. H. J. v. d. Boogaard-Wiechman, G. E. Canne Meyer-Hoogland, M. W. v. Laar en J. L. Sutmoller-Boerlijst te Amsterdam, B. v. Beek te Hengelo, G. Langeler-Wassink te Lochem, E. E. Lauterslager en G. A. Scholten te Utrecht en de heren T. Ynsen te Amsterdam, H. G. Havik te Den Haag, A. Wink te Enschede, C. Langeler te Lochem, R. Petrus te Rotterdam, S. Vos te Wormer en W. v. Ommen te Zuilen.

La 18-an de dec. doktorigis en la groningena universitato s-ro P. Hartman, ano de nia sekcio en Groningen. Lia disertacio „Relations between structure and morphology of crystals” enhavas sur pagaj 152 kaj 153 resumon en Esperanto kaj el lia tezaro n-ro 16 tekstas jene: „Er bestaat geen enkel redelijk bezwaar tegen de invoering van het Esperanto als verplicht leervak op de scholen.” Niajn elkorajn gratulojn!

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenstraat 29, Kortrijk.
Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, Sint-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).
Kasistino: F-ino J. Terryn, Raapstraat 74, Gent.
Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)
Koresponda kurso: A. Nysstraat 37, Anderlecht

La prezidanto, Sro Debrouwere, malfermis la kunvenon je la 15¹/₂h. kaj bonvenigis la ĉeestantojn, kiuj ĉi-jare ne estis multnombraj. Ni notis delegitojn de sekcioj Antwerpen, Blankenberge, Brugge, Brussel, Gent kaj Mechelen. La sekretario tuj proponis venontjare repagi la vojaĝkostojn de la delegitoj kaj de la reprezentantoj, kiuj ĉeestas la jarkunvenon. Tio estis aprobita, kun la rezervo ke la financa situacio estu bona.

Pritraktita tagordo:

1. **Financa raporto:** la kasistino, Fino Terryn, komunikas ke por la momento la Liga kaso enhavas cirkaŭ 6000 Fr., sed ke ne ĉiuj spezoj estas jam konataj. La kasistino prezentas buĝeton por la jaro 1954. kiu por la unua fojo post la milito antaŭvidas konsiderindan sumon por la disvastigo de Esperanto en nia lando.

2. **Sekretaria raporto:** la sekretario, Sro Maertens, prezentas la moralan raporton de la finiĝanta jaro 1953. Li konkludas: „Ni povas diri ke la jaro 1953 estas tiel bona kiel la rekord-jaro 1948, kiam ni atingis nian plej altan membrociferon. Ĝi estas la jaro de la ŝanĝigo: ĉiuj organizoj travivas periodon de florado kaj de vegetado, kaj nia FL. L. E. nun trapasis periodon de malvigleco. Tiu estas tamen tre relativa: aliaj Esperanto asocioj pri la sama periodo eble fierus, sed ni ja kapablas pli ol la laboron faritan dum tiuj lastaj jaroj.

Sed ne nur la financa situacio pliboniĝis; ni faris la unuajn paŝojn al kunlaboro en nia lando: komuna kongreso, fondo de Belga centra komitato de Esperanto”.

Bedaŭrinde tamen ni konstatas ke la iniciatoj ekestas preskaŭ ĉiam en la estraro: la liganoj restis same indiferentaj kiel dum la antaŭaj jaroj.”

3. **VEA-Raporto:**

S-ro Couwenberg, nia peranto, komunikas ke por la jaro 1953, 68 aliĝantoj al UEA pagis pere de li t.e. du pli ol en la antaŭa jaro. Aliflanke, nur unu anonco por la jarlibro envenis, nome la reklamo de la Urbo Gent.

4. **Kunlaboro kun aliaj landaj asocioj:**

Jam aperis en la gazeto la unuaj sciigoj pri kunlaboro kun Reĝa Belga Ligo Esperantista. La ĉeestintoj audis la kompletan raporton de la sekretario.

„Dum la antaŭlasta estrarkunveno (en Brugge), la estrado indikis tri estraranojn, kiuj devus ĉeesti la planitan kunvenon kun la delegitoj de RBLE en Mechelen, nome

Sroj Debrouwere, Maertens kaj Van Gindertaelen. La 14.11.53 tiuj estraranoj kunvenis kun Sroj Jaumotte, Kempeneers kaj Sielens. Post iom da diskutado, kiu okazis en amika atmosfero, ili decidis proponi al la ĝenerala jarkunveno la fondon de Belga Centra Komitato Esperantista, la nomo por komitato konsistanta el la supre menciitaj personoj, kiu pritraktos estonte ĉiujn problemojn de komuna intereso: tiu komitato do ne havas statuton, nek financajn postulojn, sed reprezentos por kiu ajn eksterstaranto, niajn du grandajn, landajn asociojn. Estis indikitaj kiel:

Prezidanto: Dro Kempeneers; Vicprezidantoj: Sroj Debrouwere & Jaumotte; Sekretarioj: Maertens G. kaj Sielens H.; Redaktoro: Dro Van Gindertaelen.

La adreso de la BCKE estas Generaal Lotzstraat 106, Ukkel: Brussel. La divido de tiuj oficoj estis faciligita ĉar Sroj Jaumotte anoncis ke Dro Kempeneers deziras ekŝigi kiel Prezidanto de RBLE, por plene dediĉi sin al la nacia komitato, krome, Dro Kempeneers certe estas la plej taŭga persono por reprezenti la du asociojn ĉe la registaro, kaj ĝis nun li jam faris tion nome de RBLE sola. Praktike, Dro Kempeneers parolos ekde nun nome de ĉiuj Esperantistoj en la lando.” (Daŭrigota).

M. G.

LA KASISTINO

rememoigas ke la kotizoj pagotaj al P.C. 2321.50 de V.E.B. Raapstraat, 74 - GENT, estas por la nuna jaro:

- Membro (F.E. kaj UEA-AM.) 100 fr.
- Subtenanto (same) minimume 150 fr.
- Gejunuloj (malpli ol 21 j.) 50 fr.
- Familia membro (De Esperantist) 25 fr.
- Amiko (same) 20 fr.
- Abono 75 fr.

Notu: ke la favorpreza abono (40 fr.) nur validas por la anoj kiuj pagis la kotizojn.

Por la 39a Universala Kongreso en Haarlem la kotizoj ek de 1-1-54 estas g. 22 (19,50 por la individuaj membroj de U.E.A.) Pagu la guldenon je 13,50 fr.!

UNUA LISTO DE SUBTENANTOJ.

- S-ro G. Maertens 150 fr.
- S-ro Th. Van Gindertaelen 150 fr.
- F-ino J. Terryn 150 fr.
- S-ro F. Roose 150 fr.
- S-ro F. Piot 150 fr.
- S-ro G. Debrouwere 925 fr.

LA STUDANTO

Vertaling van de opgave in het vorige nummer:

Oefening 13 A: „ZOU”

Sinjoro Jansen estis acetonta 1) kun sia 2) edzino sanktanikolaajn 3) donacojn por la infanoj. Ili foje 4) estis rigardontaj 5) en kelkaj butikoj (vendejoj). Se li estus 6) tre riĉa (riĉega), li acetu por la infanoj po unu biciklo 7). Li diris al 8) sia 9) edzino, ke ŝi ne povos 10) elspezi 11) tro multe da mono 12). Lia 13) edzino 14) esperis, ke ŝi 15) povos 10) acetu por la infanoj po unu ludilo 16). Ŝi proponis, ke ili 17) iru 18) en butikon 19). Kiam 20) ŝi 17) estis ironta 1) en la butikon venis ĉaro kun tre malmultekostaj ludiloj tra la strato 21). S-ro J. konsilis, ke ili acetu ludilojn de la stratvendisto. Lia 13) edzino timis (estis tima), ke estos tie multe pli multekoste. Kiam 20) s-ro J. estis pagonta 1) al la stratvendisto, montriĝis, ke li forĝestis sian 9) monujon. La stratvendisto diris, ke li liveros la acetajn infanojn hejme kaj tie ricevu monon.....

Opmerkingen:

- 1. Niet: acetus. Het is hier geen voorwaardelijke wijs, maar verleden toekomstige tijd: estis .onta.
- 2. Niet: lia. Na „kun” volgt een bepaling, die het bezit van het onderwerp

- aanduidt. Een inz. had: „S-ro J. kaj lia edzino...” Op zichzelf een goede, maar wel wat vrije vertaling. Na „kaj” volgt een deel van het (dan samengesteld) onderwerp; dus dan niet „sia”, maar „lia”.
- 3. Ook: sanktaklaŭsajn. Ook: donacojn por la infanoj okaze de la festo de Sankta Nicolao.
- 4. Niet: unufoje. Te sterk. Dan kan het woordje „eens” nog beter onvertaald blijven.
- 5. Niet een j: het zegt iets van „ili”; dus meervoud. Zie overigens noot 1.
- 6. Hier is het nu echt voorwaardelijke wijs na „se” met een onvervulde voorwaarde.
- 7. Zamenhof beveelt in „Lingvaj Respondoj” (p. 40) aan na „po” geen n te gebruiken. Hij vat „po” op als een voorzetsel, net als „da”. Jongere Esperantologen, vooral Kalocsay, beweren, dat „po” een bijwoord is, net als „nur”, en dat het alleen betrekking heeft op het telwoord, niet op het volgende zelfstandige naamwoord, dat een n moet hebben, als het lijdend voorwerp is. Voor beide standpunten is veel te zeggen. Ik houd mij maar aan Zamenhof. Men kan „po” op deze wijze vermijden: li acetu por ĉiu infano biciklon. Na „po” moet een telwoord volgen; dus 8. Niet: kontraŭ. Oni diras ion al iu.
- 9. Bezit van „li”, onderwerp. Zie 2).
- 10. Indirecte rede na „diris”.
- 11. Niet: eldoni. Oni elspezas monon kaj eldonas librojn, gazetojn.
- 12. Ook: tro multan monon; tromulten da mono.
- 13. Niet: sia. Onderwerp! Zie noot 2.
- 14. Niet: virino. Vrouw (= echtgenote) = edzino. Man (= echtgenoot) = edzo.
- 15. Zij zou = si ...; zij zouden = ili... Zij (enkelvoud) = si; zij (meervoud) = ili.
- 16. Niet: ludajo; peco de ludajo. Speelgoed = ludiloj; ludilaro. Een stuk speelgoed = ludilo.
- 17. Zie noot 15.
- 18. Aanvoegende wijs, als er in de hoofdzin een raad, verzoek, wens, bevel of gebod wordt uitgedrukt.
- 19. Richtings-n. Ook: ke ili eniru butikon. (Nu bep. zonder voorz., dus met een n).
- 20. Niet: Tiam (bijwoord). Toen (voegwoord) = Kiam
- 21. Richtings-n lijkt mij hier noch noodzakelijk, noch wenselijk. Zie „Lingvaj Resp.” van Zamenhof, bl. 44.

Oefening: 11B

EEN NEUTRALE TAAL NODIG.

Een exporteur in de Verenigde Staten had handelsrelaties met een Braziliaanse importeur. De Noord-Amerikaan gebruikte voor zijn circulaires, folders, en correspondentie gemakshalve zijn eigen taal, Amerikaans Engels. Aangezien dit voor de Braziliaan vaak moeilijkheden, ja zelfs misverstan-

den opleverde, verzocht hij de man uit de V.S. zich te bedienen van de taal van het land, waarmee hij betrekkingen onderhield, voor Brazilië dus van het Portugees. Mocht dat voor hem bezwaren meebrengen, dan zou het gebruik van Esperanto ook zeer op prijs worden gesteld. Een alleszins billijk verzoek.

Een Fries had een vordering op een Vlaamse opdrachtgever, die zijn schuld voldeed via een bank in Brussel. De Brusselse bank zond de Fries een chèque, die gesteld was in het Frans!

De Fries zond een kwitantie naar de bank en dankte voor de betaling, maar uitte ook zijn bevreemding over het gebruik van de Franse taal in het verkeer met Nederland, waarmee een groot gedeelte van de Belgische bevolking een taal gemeen had. Hij verwachtte niet, dat de bank zo beleefd zou zijn hem in het Fries, zijn moedertaal, te schrijven, maar hoopte toch, dat de bank in het verkeer met Nederland Nederlands zou gebruiken. Als daartegen bezwaar was, zou de neutrale taal Esperanto de gewenste oplossing geven.

Bij geruchte vernam de Fries, dat deze brief enige opschudding had veroorzaakt in de Brusselse bank. Zal hij gunstige gevolgen hebben?

Twee historische gevallen, die met vele vermeerderd zouden kunnen worden, maar reeds aantonen, dat een neutrale internationale handelstaal zeer nodig is om nationale gevoeligheden te ontzien.

Vertalingen vóór 15 Jan. aan de bekende adressen. (Zie vorige nummers).

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 157/158: F-ino C.Boute, el Blankenberge, por V.E.B.; kaj por L.E.E.N.: S-ino A.M.v.d.Wal-Brethouwer, el Arnhem.

Al ĉiuj fidelaj kaj okazaj solvintoj la Enigmo-angulo prezentas siajn korajn bondezirojn por la nova jaro. Ĝi esperas, ke ankaŭ ĉi-jare ĝi povos havigi al vi kelkajn distrajn kaj samtempe instruajn momentojn. Ĝi esperas ankaŭ, ke multaj novuloj provos sian forton, trovos la enigmojn laŭ sia gusto kaj konsciigos kiom la solvado firmigas, ampleksigas ilian scion pri nia lingvo kaj la Movado. Certe, la proponitaj problemoj ne ĉiam estos same facilaj, tamen por sukcesi sufiĉos iom da pacienco kaj la konsultado de fidinda fonto, pri kiu ĉiu serioza studento disponas.

Pro memorigo, ni ripetas la regularon de la konkurso.

1. Ĉiu korekta solvo havigas 5 poentojn al la partopreninto; solvo parte ĝusta ne tute senvalorigas.
2. Ĉiumonate premio estas atribuita al la solvinto kun la plej alta poentnombro.
3. La konkurso ĉiam daŭras.
4. Difino kun (R) celas vorton, eĉ derivitan aŭ kunmetitan, sen la gramatikaj finaj A.E.I.O.
5. Ĉiu uzata radiko troviĝas en la vortaro de SCHIDLÖF aŭ MEULENHOFHOF aŭ en PLENA VORTARO DE ESPERANTO (Grosjean-Maupin). Nomoj el niaj Literaturo kaj Movado estas troveblaj en:
ISBRUCKER: Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado.
DEGENKAMP: Esperanto 60-jara.
Provu, karaj Legantoj, kaj sendube vi baldaŭ fariĝos fervoraj serĉantoj.

SOLVOJ.

159. fotografajo, triangulo, lambastono, buterlakto, parolanto, malakcepti, neokupita, sekvinbero, horlogisto, senpartia, strikanto, frambuĵo, ŝtupetaro, ĉirkaŭfrazo, akvolilio, manradiko, mandolĉigi, sukercano, desegnisto, rozkolora, estrano, blondulino, rabotilo, malsatulo, idealisto, batalkampoj, sanatorio, florbrasiko, monarkio, posedanto. Rusto mangas feron, ĉagreno la koron.

160. *Horiz.*: fisk, afabia, mailev, lavi, kaslibr, abort, rabi, ret, korne, ripet, malĝentilul (la klarigo „krudulo“ forfalas el la pasintmonataj donitaĵoj).

Vert.: dankem, cikad, kovril, okulhar, streĉe, naivul, tret, jarlibr, rampul, olivo, pistil.

161. SANGENIGMO.

Trovu sesliterajn vortojn, respondantajn al la subaj klarigoj, laŭ jena procedo: forigu unu literon el la unua vorto, aliordigu se necese la postrestantajn kaj aldonu novan literon por formi la duan vorton, k.t.p., ĝis sub 20 vi retrovos la saman vorton kiel sub 1.

1. pastajo fritita en pato.
2. kredo, ke io realigos.
3. izoligo.
4. ama tuŝeto.
5. dolĉajo.
6. mallongigo.
7. grando.
8. cifero.
9. leda strio.
10. eco, pro kiu oni rajtas pri rekompenco.
11. meti en akvon.
12. rekompenco.
13. rimedo.
14. ĉasbesto.
15. forta malkontentigo.
16. ruĝa substanco, el kiu oni faras juvelojn.
17. trinkvazo.
18. trofo de indianoj.
19. elektra fajrero.

162. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale: 1. senfina; ege amata persono. 3. delikate plaĉi(R); estonta monaĥino(R). 5. surstrata defluilejo(R). 6. tersurfaco; popoleto(R). 7. acidata bero(R); pagi por dumtempa uzado(R). 8. senigita je kelkaj komplikajoj(R). 10. molusko(R); funkciigi uzante la manojn(R). 12. ruza malhonestulo(R); aliri(R).

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											
12											

Vertikale: 1. arbo(R). 2. karakteriza eco(R); klarigi per ekzemploj(R). 3. perforte forpreni. 4. ŝirma muro(R); forte grati(R). 5. kovri per alĝustigita kovraĵo. 6. vegetaĵo kies tinkturo estas uzata kontraŭ kantoj; personigo de riĉeco(R). 7. sufikso. 8. elpensi(R);

LA BENELUKSA KONGRESO EN LIEĜO

La L.K.K. por la Beneluxa Kongreso en Lieĝo nun finpretigas la programon de la dua komuna jarkonferenco de la tri Ligoj, kiuj tiel bone kunarangiĝis la Kongreson 1953a, en Antverpeno.

Tiu ĉi programo aperos, kun multaj detaloj, en la februara numero de nia revuo.

Sed, jam de nun, oni, en la grupoj, vigle laboru por enspezi la kotizojn... kaj ankaŭ por aranĝi la partoprenon al la programo de la vesperfestoj, kiu, unufoje pli -, devos esti respeguligo de la atmosfero, kiu regas en la diversaj grupoj de Belga kaj Flandra Ligoj.

La Sekretario de la L.K.K. jam alvokis ĉiujn grupestrojn, pere de iliaj Ligestroj, kaj, senescepte, ili respondu kiel eble plej baldaŭ al tiu alvoko.

Dum la unuaj tri monatoj de tiu ĉi jaro, la kotizo restas fiksita je Fr. 50,-, kiujn la membroj de grupoj pagu al sia kasisto; kiun la grupoj kasistoj pagu al la partoprenantaj Ligoj pagu al la P.C.K. de la Beneluxa Esperanto-Kongreso No. 10.06.30.

Ne estas necese, nek dezirinde ke, ĝis la apero de la definitiva programo, la interesuloj sin turnu rekte al la L.K.K. por detaloj.

Ĉio baldaŭ estos komunikata pere de la grupoj kaj de la revuoj.

Intertempe ĉiu helpu al plifirmigo de la Honoraj Kolonoj, starigitaj dum la antaŭa Pentekosta kongreso.

La Loka Kongresa Komitato:

- Prezidanto: J. Desonay
 Vicprezidantoj: D-ro Th. V. Gindertaelen
 P. M. Mahesoone
 Sekretario: J. Soyeur
 Kasistino: S-ino J. Plyson
 Membroj: J. Héron
 M. Guyot
 J. Koeune

La adreso de la L.K.K. estas: 91, rue du Chêne, Seraing.

havana grandan daŭron. 9. esti varmega. 10. balanciĝi ĉirkaŭ ekvilibra punkto; li emas stulte rigardadi(R). 11. povi esti farata. 12. pompa vesto de pastro(R); uzi ion tiel ke ĝi donu bonan rezulton(R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al S-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 20/1/1954.

Ĉu vi estas eks-studento de supera komerca lernejo?

Se jes, interesas vin scii, ke la problemoj de la Internacia lingvo estos unu el la temoj de la XIV Internacia Kongreso de Eksstudentoj de la Supera Komerca Instruado, kiu okazos en Lyon, Francujo de junio 26, ĝis julio 4.1954.

Pli ol ducent asocioj el la tuta mondo sendos delegitojn al tiu Kongreso, kiu celas organizi la kunlaboradon de eks-studentoj de la Supera Komerca Instruado sur praktikaj fundamentoj.

Interesatoj bonvolu tuj skribi al Richard LEVIN, Président de l'Association des Anciens Elèves de l'École Supérieure de Commerce de Lyon, 34, rue de la Charité, Lyon.

Diversaĵoj

Tre ĉarma ideo naskiĝis antaŭ kelkaj jaroj en Gvatemalo. Estis la ideo pri internacia kolektado de infandeseĝoj.

La esperantoklubo la Aglo en Karlskoga, Svedlando, nun kaptis la ideon. Knabino en nia urbo nome gajnis diplomon en tiu internacia ekspozicio en Gvatemalo, kaj tio vekis intereson ĉe ni. Ni aranĝos la 3an ĝis 13an de septembro 1954 en la Arta halo montradon kaj konkurson internacian. En tiu konkurso oni disdonos premiojn je valoro de 750 steloj, ĉ. US-dol-60.-, tiel ke la gajnonto en ĉiu jarklaso de 7 ĝis 14 jaroj ricevos premion je valoro de ĉ. 55 steloj, kaj la sekvantaj 4 po unu.

Ni esperas, ke samideanoj ĉirkaŭ la terglobo interesiĝos pri la afero kaj kunhelpos instigante la instruistojn aranĝi en siaj klasoj desegnadon sub la temo „Nia lando kaj popolo“.

Se la montrado fariĝos sukcesa eble estos aranĝata migranta ekspozicio tra tuta Svedlando. Dorsflanke de la desegnoj skribu PRESLITERE nomon kaj adreson, sub la bildo titolon, nomon, agon kaj landon. La desegnoj devas esti antaŭ la fino de junio 1954 sub adreso: Kga Esp. soc. la Aglo c/o Gunhild Tistad, Hotellgatan 5, KARLSKOGA, Svedlando.

La nederlanda asocio por helpo al infanojn en malfacilaj ĉirkonstancoj „Pro Juventute“, Gooiergracht 145, Laren (N.H.) Nederlando, poŝtkonto 517.400, eldonis *Prinsessen-Kalender 1954*. Prezo F. 2,75.

Ĉi tiu grandformata murkalendaro estas dediĉita al la infanoj de la reĝa familio kaj prezentas sur deŝireblaj monafolioj belajn fotojn de la reĝidinoj irantaj al la lernejo, promenantaj, pilkludantaj ktp. Tre rekomendinda.

PEREO - - originale verkita de F.WEEKE

(Premiita en la Beneluxa Literatura Konkurso 1953)

senmove aŭskultas la bruegon de la vento, kies perforto nun kvazaŭ ĉiumomente kreskas en pluvotorentoj.

Kiam kruda ventopuŝo krakigas la fenestrojn, ŝi paligas. „Ho, ho, kara ĉielo, kio okazos do? Kia veteraĉo, veteraĉo“, ŝi plendas.

Bruno venas ĉe ŝin, metas la antaŭpiedojn sur ŝiajn genuojn; ŝi demande rigardas lin. Karese ŝi frotas per mano la besto-kapon: „Bruno, kara besto, ĉu ankaŭ vi antaŭsentas ion teruran?“

Ade pli kaj pli forte la vento fajfas, siblas kaj tontras ĉirkaŭ la domo dum la pluvego skurĝas la fenestrojn. Vere, ŝajnas ke nun la tuta domo tremas sur siaj fundamentoj!

Guste kiam la revenanta farmisto malfermas la pordon de la ĉambro, furioza ventopuŝo levigas kaj krak... krak... krak... la vitroj abrupte tute frakasigas.

Kun laŭta ekkrio de teruro kaj angoro, la virino salte ekstaras kaj jetas sin al la brusto de la edzo, kiu amoplene provas kvietigi ŝin.

Tra la truoj de la fenestroj la ventego nun peligas internen; la kurtenoj flirtas supren kiam la pluvego jam tute malsekiĝis la tapiŝon, kvazaŭ prisemitan per vitroj. Ĉe la plafono la lampo balanciĝas kaj el la forno la cindro disvastiĝas tra la ĉambron, kiel maldensa nebulo. Senespera kaj singultante la edzino konsideras la ruinigon de la ĉambro, antaŭe tiel hejmeca kaj kvieta...

Subite ŝi ekkrias: „Johano, ĉu vi aŭdas? Aŭskultu, aŭskultu. Ĉu ne sonoras la preĝejaĵ sonoriloj? Ho, karulo, karulo, tio signifas la grandan alarmon! Sendube okazis granda katastrofo!“

Kvazaŭ ŝtoniginte ambaŭ streĉas la orelojn, plu aŭskultas la avertan kaj samtempe tiel timigan voĉon. Sed baldaŭ la edzo vigliĝas.

„Anjo, li diras, tio konfirmas ke ie la digo rompiĝis. Kaj ni loĝas ne tre malproksime de ĝi; la akvo povas atingi nian domon, eble post kvarono de horo. Kolektu kiel eble rapide vestaĵojn, tolaĵojn, mangajojn kaj portu ĉion sur la subtegmentejon. Veku la knabon, vestu lin kaj ankaŭ lin portu supren. Mi jen iras al la stalo por liberigi la bestojn; poste mi revenos

helpi vin, sed rapidu, rapidu...“

La farmisto tute pravus. Longan tempon la digo kontraŭstaris la atakojn de la daŭre altiganta akvo, kies ondoj senhalte batemis la murojn de la bedaŭrinde tro malforta remparo. Finfine, kelkaj ondoj transsaltis la digon kaj tio estis la komenco de la fino. Jam pliaj ondoj jetis sin trans la digon, kuntrenante pecon post peco el la digo-korpo kaj baldaŭ granda parto de ĝi ne plu povis rezisti la furiozon de la akvoj. Kvazaŭ triumfe la ondoj ruliĝis tra la breĉon, jetis sin hurlante, bolante kaj ŝaumante en la polderon, kiu kuŝas pli ol kvar metrojn sub la normala marnivelo.

Sed la farmisto ne sciis la grandan rapidecon per kiu la akvo fluegis tra la truon, largan tridek metrojn! Revenante el la stalo li konstatis, je sia senlima konsterniĝo, ke la koridoro jam malaperis sub la akvo, kiu envenis sub la antaŭpordo.

„Anjo, Anjo, li vokas, ĉu vi jam estas supre?“ Antaŭ ol ŝi povis respondi, la elektra lumo subite estingiĝas kaj li aŭdas la edzinon laŭte voki: „Johano, Johano, venu supren, venu!“

Nenion plu povante vidi, la farmisto stumblas supren al la subtegmentejon, kie li trovas sian edzinon en granda teruro. La tumulto de la ventego estas tie surdiga. La farmisto sidigas ŝin sur kesto kaj, prenante la filon sur la genuojn, li diras: „Nun ni ne plu povas fari ion. Ni devas atendi la taglumon“.

Trioje la homaj estaĵoj sidas en la mallumo — unu ĉe la alia, ne konjektante ke por ili ne plu venos taglumo!

Ekstere la akvo rapide kreskas, grandamase fluante tra la frakasitaj fenestroj en la domon. Kelkaj seĝoj jam flosas sur la akvosupraĵo en la ĉambro. Baldaŭ ankaŭ la tablo forlasas la plankon. Ĉiumomente la akvonivelo pli kaj pli altiĝas kaj pli grandaj fariĝas la ondoj, kiuj jetas sin kontraŭ la murojn. Jen alvenas nova grandega ondo portante dikan trabon, kiun ĝi per giganta forto puŝegas kontraŭ la muron, precize inter la du fenestroj... kaj la

muro grandparte ruinigas. Senhalte, kun la helpo de pluvo kaj ventego, la ondoj reatakas ĝis finfine la muro devas cedi: la tuta fasado de la domo ŝanceliĝas, renversiĝas kaj malaperas en la ondojn.

Sur la subtegmentejon la kompatindaj homoj estas nun en plena furiozo de la ŝtormo; ili konsciigas ke ilia vivo estas minacata ĉar neniel montriĝas ke la veteraĉo baldaŭ kvietigos.

Kun larĝe malfermitaj okuloj, plenaj de angoro kaj teruro, la geedzoj devas senhelpe kaj senfare suferi la ruinigon de la bela dometo. Ili aŭdas la plaŭdadon de la akvo kaj la interpuŝigon de la mebloj en la malsupra ĉambro. Tute neatendite unu el la flankmuroj cedas, malaperas, kuntrenante en la akvon grandan parton de la tegmento. La planko de la subtegmentejon dekliviĝas; alruliĝanta ondo forbalaas ĉion, kio ne estas sufiĉe peze aŭ firme fiksita kaj, antaŭ ol la geedzoj ekkonscias la okazajn, alvenas plia impeta ondo, kiu superŝutas ilin, forportante ne nur la keston sur kiu ili sidis, sed ankaŭ ilin mem. Kiam la ondo reruliĝas, la geedzoj troviĝas en la ŝaŭmanta, kirlanta akvo, jam for de la domo. Senespera kriante la edzino barmarkas kaj penas atingi sian edzon, kiu havas la fileton en la brakoj, dum Bruno naĝas ĉe lia flanko. La lukto de la virino ne daŭras longtempe: nagi ja maleblas en la ondeganta akvo-amaso kaj ŝiaj tute malsekaj vestoj suĉas sin malsupren. Kun lasta ekkrio, ŝi malaperas sub la akvon.

Kvankam la farmisto streĉas ĉiujn fortojn, ankaŭ lia batalo montriĝas vana, ĉar liaj movoj estas tute ĝenataj: per unu brako li tenas sian filon, per la alia li klopodas ne droni, movi sin. Bruno, kiu ĉiam restas ĉe lia flanko, ne povis rezisti la ripetajn superŝutojn de la ondoj kaj jam malaperis.

Flosanta trabo hazarde puŝas la viron kontraŭ la kapon kaj finiĝas la lukto. Senkonscia pro la forta bato ambaŭ subakviĝas... la patro kun sia filo en la brakoj.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-bond Postbus 100 — Mechelen en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. - Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned).

La familio de la farmisto Johano troviĝas en la familia ĉambro. Oni ĵus vespermanĝis. La patrino purigis la manĝilaron kaj vazaron; ŝi nun trikas ĉe la tablo; apude la trijara fileto amuziĝas per siaj ludiloj sur la planko. La patro fumas pipon kaj legas sian gazeton. La forno disradias agrablan varmon; antaŭ ĝi Bruno, bela ŝafisthundo okupas sian kutiman lokon, kie li trankvile dormas kun la kapo sur la antaŭpiedo. La etoso de la ĉambro estas hejmeca, kvieta, harmonia.

La patrino ĵus rigardis la murhorlogon kaj, ĉar ĝi jam indikas la kvaronon post la naŭa, ŝi formetas la trikajon kaj admonas: „Venu, Joĉjo, dormotempo! Panjo portos vin supren“.

Neniel volonte la knabeto lasas siajn ludilojn, sed li tamen ekstaras, kolektas la diversajn objektojn en korbeton; ĉi tiun li metas en ŝrankon kaj saltetas al la patrino, grimpas sur ŝiajn genuojn, forte premante siajn brakojn ĉirkaŭ ŝian kolon. Kun la infano en la brakoj, la patrino levigas, klimas sin, dirante: „Donu noktiseton al Paĉjo kaj diru: Bonan nokton, Paĉjo!“ — „Dormu bone, mia filo“, diras la patro, tre fiera ja pri sia „dinasti-daŭriganto“.

Kiam edzino kaj filo forlasis la ĉambron, la farmisto ne tuj reprenas sian gazeton. Li streĉas la orelojn, murmuras: „Nu, nu, kia vento! Kiom multe ĝi plifortiĝis en la lastaj horoj!“

Subite la hundo vekigis, mallaŭte ĝembojis kaj maltrankvile iris tra la ĉambro. „Kio do al vi, Bruno“, diras la mastro. „Ĉu vi aŭdas ion?“ La mastro iom miris pri la stranga teniĝo de la hundo sed la pordo jam malfermiĝis kaj la edzino eniris, tremvoĉe demandante: „Johano, ĉu vi aŭdas kiel terure blovas la vento? Min angorigas tiu impeteco! Supre oni aŭdas ĝin multe pli ol ĉi tie kaj, kiam mi enlitiĝis la knabon mi nepre sentis ke, ĉe forta ventopuŝo, la tuta domo ŝanceliĝas. Mi tute ne baldaŭ enlitiĝos!“

„Nu, nu, kara edzino, ne tiel timu kaj maltrankvilu! Vi ja scias ke nia dometo estas ankoraŭ nova kaj forte konstruita. Kio povas okazi! Sed vi ja pravas: la vento vere plifortiĝis, Mi iros kontroli ĉu ĉio estas en ordo en la stalo.“

Li forlasas la ĉambron kaj la edzino denove sidigas sur la seĝo; ŝi tamen ne reprenas la trikajon. Kun la manoj en la sino kaj iom kurbiginta dorso ŝi